ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 10

Oktobro 2015 Kol.366/31

xxxx

Ni partoprenis la centan UK-on en Lillo

kun la grupo da esperantistoj el Ĉeĥio, Moravio kaj Germanio, kiun organizis AEH sub la gvido de Lenka Angelová. Ni povis ĝui ne nur bonkvalitan programon de la UK, sed ankaŭ kelkajn tre belajn ekskursojn. La programo proponis multajn kulturajn kaj fakajn aranĝojn, kursojn, dancadon, kantadon... tion jam konas ĉiu, kiu foje la kongreson partoprenis. La franca LKK (loka kongresa komitato) tre laboris por proponi gustumon de franca vivo, kulturo, por proksimigi al la ĉeestantoj la Nordan Francion.

La ekskursoj gvidis nin en famajn urbojn (ekzemple Bruselon, Genton...), ni ĝuis eĉ naturon sur la kabo "Blanka nazo", sed neforgesebla travivaĵo por ni ĉiuj estis vizito de Bulonjo-ĉe-Maro, kie ni partoprenis solenan ceremonion omaĝe de la centa tutmonda esperantista renkontiĝo. Grandan kaj neforgeseblan impreson en ni ĉiuj postlasis ankaŭ la akcepto de esperantistoj en la urbodomo.
Dankon por ĉio, AEH, dankon por ĉio, Lenka!!!

Jen unu epizodo de mia unua kongreso:

Post la fino de la ceremonio ĉe la busto de Zamenhof en Bulonjo-sur-Maro invitis nin la urbestro al eta refreŝiĝo en la negrandan urbodoman salonon. Tien klopodis veni plej multe da homoj kaj tial post eta tempo tie ne eblis spiri. Mi klopodis iri eksteren, kie jam rezignis ankaŭ Jindřiška. Do ni ambaŭ venis antaŭ la urbodomon al malalta palisa barilo, post kiu s-ro urbestro havis sian "ĝardeneton".

Pere de vojetoj kaj bariletoj estis ekspoziciataj diversaj scenoj. Meze de floroj estis dika porketo, kontraŭ ĝi maldika ĉevaleto. Inter zorgeme elsarkitaj legomoj kuŝis sur du tabloj fruktoj, rostita kokido kaj fiŝo. Post ili pendis femuraĵo, ŝnur-

ligitaj ajloj kaj kapsikoj. Inter pluaj floroj staris lul-brakseĝo kaj kontraŭ ĝi metala lito kun kusenoj. En la urtikoj staris malfermitaj kestoj kun perloj kaj oraj brikoj. Sur la finfalĉita gazono ripozis heliko. La scenon de emocio tie anstataŭis "kolero" per renversitaj tableto kaj seĝo, depiedbatita ĉapelo kaj virinaj ŝuetoj. Ĉiuj estis fiartaĵoj, io el plasto, sed en tiu ĉi medio kaj aranĝo ili impresis surprize kaj ĉarme.

Eva Pazourková

Karaj ĉeĥaj geamikoj! (letero de germana esperantistino)

kun grandaj ĝojo, plezuro kaj dankemo mi rememoras la busvojaĝon kune kun vi kaj la bonegan sukcesan 100-an la UK en Lillo.

Dum la tuta semajno mi estis vere feliĉa. Mi trovis multajn malnovajn kaj novajn geamikojn. Nun mi havas bonan leteramikecon kun du ĉeĥaj geamikoj de vi. Mi tre ŝatas skribi kaj respondi en Esperanto.

Vidu miajn multajn fotojn kaj filmetojn. Mi ne fotis kaj filmis profesie, sed kun granda ĝojo kaj plezuro. Tamen mi sendas ilin al vi por belegaj rememoroj al UK.

Mi pardonpetas se ne ĉio plaĉas, sed tamen mi esperas, ke plaĉos al vi entute. Mi sidas en la rulseĝo kun la verda ĉapeleto. Bedaŭrinde nia Klaus-Dieter estis malsana kaj ne bonfartis pro doloroj, sed intertempe li nun bonfartas.

Mi havis la plej bonan sidlokon en la kongresejo en la unua vico por fotadi el mia rulseĝo. Mi estis tute dankema al vi, ke vi kunprenis min en vian buson kun mia rulseĝo kaj kun mia verda ĉapeleto.

Grandan dankon al Lenka Angelova por la bonega organizado.
Ĉio estis por mi en bona ordo. Kun afablaj salutoj al ĉiuj partoprenantoj de nia busvojaĝo. Mi deziras ricevadi vian ĉiumonate eldonatan gazeton Informilo per retmesaĝoj por 10eur/jaro. Mia profesio nun estas pentristino de portretoj, bestoj, floroj, naturo..., mi ŝatas skribi E-leterojn al geamikoj, instrui Esperanton kaj arton, legi... Mi jam antaŭdankas por via Informilo.
Helga Plötner el Germanio. helga.ploetner@gmx.de
www.dropbox.com/sh/8t23hh1kw7coalr/AACro91N9YLsMkGhnafp9oyoa?dl=0

Iom da rememoroj el la vojaĝo al la UK

Kvankam bonvenigis nin pluvegaj Belgio kaj Francio, tamen en la kongresejo mi travivis belegajn momentojn. Natalie kaj Claude el Francio brakumis min, mi konis ilin el Skokovy, kasisto de francaj fervojistoj eĉ haltigis min kaj diris, ke li havas por mi donaceton. Gerard kaj Jeaninne preskaŭ ĉiuvespere regalis min kaj post la programo eĉ veturigis min al la hotelo, kiam ili vidis, kiel mi ankoraŭ ne bone marŝas.
Ankaŭ niaj germanaj esperantistoj estis agrablaj kaj helpemaj. Dankon al Karlo, kiu helpis al mi, kiam mi falis surteren kaj akompanis min al la hotelo.
La plej malagrabla estis por mi la tuttaga ekskurso al Bulonjo-ĉe-Maro.
Se ne estus pruntita rulseĝo de mia kunloĝantino, (por kiu kuris la gvidantino Lenka) kaj aŭtomobilo de unu franca esperantisto, tute nekonata viro, kiu veturigis min al la urbodomo, kie nin ĉiujn invitis la urbestro, mi jam ne vivus. Poste mankis tempo al mi, por ĝui la maron. Mi vidis Anglion de malproksime.
Fino bona, ĉio bona. Dankon al ĉiuj anĝeloj, kiuj helpis al mi.

Líba Filipová

Observokapablo

En la unua kongresa ĵurnalo *Belfrido* en Lillo dum la UK aperis sciigo pri aranĝo en proksima librovendejo de eksterlanda literaturo. Do mi kun kelkaj amikoj iris tien. H. Tonkin kaj I. Ertl vigle kaj sprite rakontis Esperante kaj france pri la enhavo kaj historio de la libro *Maskerado ĉirkaŭ morto*, (kiun mi tradukis en la ĉeĥan). La aŭtoro de la traduko al la franca lingvo

ne ĉeestis kaj la libro ne estis disponebla por vendo. Nur unu ekzemplero, kiun ni vidis, estis verŝajne de la posedanto – István Ertl. Humphrey Tonkin konfesis, ke neniu lin petis pri aŭtoraj rajtoj kaj ke li eĉ ne sukcesis ricevi la libron el la eldonejo fare de poŝta servo.
Pri la aranĝo zorgis Neil Blonstein el Usono. Jindřiška Drahotová

La lasta travivaĵo el UK Lillo venis de nia regula raport-kontribuantino Liba Gabalda el Francio. Tamen mi pardonpetas, ke mi ne povas publikigi la tutan raporton, mi uzos nur la partojn, pri kiuj neniu alia skribis red.

Koncizaj informoj el UK:

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto La voix du Nord (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.

Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dek du esperantistoj ricevis diplomon pri elstara kaj arta agadoj. Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin. Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj – venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton. Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmuloj, tamen perdis 4-0 kontraŭ skipo de Okcidenta Saharo.

La 1-an de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvar-

dekjara kaj kvindekjara membreco al UEA. Antaŭ la fino prezentiĝis sur la podio infanoj el la Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko. Gijom' Armide pianludis. Al la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo. Clay Magalhaes dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio Petro Baláž kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare.

Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláž petis pri edziĝo sian polan koramikinon Dorotka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉringon. Fine estis kantata la Esperanto-himno *La Espero*.

Liba Gabalda

Fina punkto post la UK :

Al mi plaĉis „antaŭkongreso“ kaj „postkongreso“: **antaŭ** sendis al mi amikino – neesperantistino la artikolon el la regionaj gazetoj „Nové Hradecko“, kaj "Pardubický deník" de la aŭtorino Jarmila Rýznarová. **Post** mi povis spekti „rezulto-raportaĵon“, kiun havis Lenka Angelová en la regiona radio-elsendejo Pardubice tuj post la alveno kaj similan, kiun efektivigis Milada Zemanová en sia regiona radioelsendejo Jihlava. Al ĉiuj tri aŭtorinoj mi sincere gratulas: videblas, ke ankaŭ nialanda movado donas siajn fruktojn.

Margit Turková

Sed du artikoloj venis ankaŭ de la ĵurnalo Horácké noviny de s-anino Dr. Kamila Bártlová el Okříšky. La unua havas titolon: "Bártlová preparas sin al 100-a kongreso de esperantistoj" kaj la dua nomiĝas:"Mi entuziasmiĝis, kiom da esperantistoj estas en la mondo".

Gratulas la redakcio

La 71-a Internacia Junulara Kongreso

Tricento da junuloj el ĉiuj partoj de la mondo arigis sin en la germana urbo Wiesbaden, sudokcidente de Frankfurto, por la 71-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). La etoso, kiel imageble, mojosa, la ejo tre konvena kun bone ekipita koncertejo, abundaj salonoj, sespersonaj dormoĉambroj, amasloĝejoj kaj spaco por tendumi en la tereno mem. Programo riĉa kaj

partopreniga, kun horoj adaptitaj al la bezonoj de la multaj gufujemuloj. Koncertoj ĉiu-vespere – i.a. Jonny M, JoMo, Sepa kaj Asorti, DĴ Kunar, Inicialoj DC, Ĵele, DĴ Leo. Plie kvizo laŭ la modelo 'Familiduelo', surprize altkvalita multlingva karaokeo, 3D-kinejo kun kontinua programaro, ĉio subtitolita en Esperanto, ktp. ktp. La komitato de TEJO elektis novan estraron kun nur kvin membroj – ili do sekvis la tendencon en ILEI, kies estraro sveltiĝis de 9 al 7, ĉe TEJO de 7 al 5. La nova prezidanto: Michael Boris MANDIROLA el Italio. Jindřiška Drahotová

Jubilea 10-a SES en la slovakia urbo Martin

Ek de la 11-a ĝis la 19-a de julio 2015 okazis SES = Somera Esperantista Studado, la jubilea deka renkontiĝo de esperantistoj. Partoprenis 190 homoj el 25 landoj. Dum la semajno ni ne nur lernis la lingvon, sed amuziĝis pere ludoj kaj aŭskultis koncertojn, sed mi ankaŭ lernis labori komputile. Mi estas tre dankema al tiuj, kiuj havis paciencon kaj en tio helpis al mi.

Pro mia longa paŭzo, kaŭzita de diversaj malsanoj kaj operacioj, mi estis envicigita al kurso B2, meznivelaj scioj. Mia brita instruisto TIM MORLEY preparis buntajn, amuzajn kaj interesajn programerojn, kiel gramatikajn, tiel ludajn. Kelkaj el ni preparis 5-minutajn prelegetojn pri diversaj temoj. Ĉiuj sukcesis kaj ricevis atestilon por la partopreno. Alberto el Katalunio alportis gitaron kaj ni kantis. Ni spektis ankaŭ modernan dancon, kiun prezentis unu nia samklasano.

Danke al bona kolektivo ni povis reciproke helpi nin. Estis por mi interese, kiam mi povis helpi al iu blinda esperantisto prepari lian vesperan koncerton. Li donis tekstojn al la organizantoj, ili prizorgis al li pianon, mikrofo-

non kaj teknikiston kaj mi nur admiris, kiel lerta estas Karsten Schnathorst nomata Kaŝi; li vere laŭ la organizantoj estis stelo de la vespero, poste ĉiuj dancis kaj kunkantis. Internacia kaj adiaŭa koncertoj estis por li ebleco por montri, kion li scipovas fari. Ankaŭ aliaj vesperaj programoj plaĉis al mi. Interesa estis, kiam dum unu vespero ĉiu nacio prezentis siajn manĝojn kaj trinkaĵojn. Liba Filipová

I n v i t o j

1) La 42-a lingva seminario en SKOKOVY realiĝos de la 19-a de oktobro ĝis la 25-a de oktobro 2015. Aliĝu ĉe Jindřiška Drahotová, (+420) 326 731 845 aŭ: drahotova@esperanto.cz

2) Aŭtunaj ferioj en la franca kastelo Greziljono estos de la 23-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015: lingva seminario kun Christian Rivière kaj Janine Dumoulin, AMO-seminario *'Grimpi la monton granitan'* kun Stefan MacGill, rekta metodo kun Zsófia Pataki, speciala programo por infanoj, inkl. Halovena vespero kaj aliaj aktivaĵoj.

kastelo@gresillon.org

Interesa, ĉu?

La studentino de la universitato en Pardubice elektis kiel temon de sia diploma laboro "Esperanto en Pardubice". Kvankam ŝi unue serĉis materialojn en la Ŝtata arkivo, tie ne estis tro da informoj. Poste ŝi venis en nian klubon kaj ĉe ni ricevis kiel broŝurojn pri 100 jaroj de la klubo, tiel la tutan historion de AEH. Interesatoj skribu al la adreso de nia redakcio.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.